



An organ of the Esperanto Association of Britain

Organo de Esperanto-Asocio de Britio

No. 26, July–September 2004 ★ N-ro 26, julio–septembro 2004

ISSN 1741-4679

**International Communication without Discrimination ★ Human Rights in Practice
Internacia Komunikado sen Diskriminacio ★ Homaj Rajtoj en la Praktiko**

Elstara kongreso festis 100-jariĝon de BEA/EAB

• *Nova prezidanto elektita*

**First Esperanto-speaking Member
of the European
Parliament: p.9**

La 86-a Brita Kongreso de Esperanto en Felixstowe elstaras pro pluraj kialoj. Ne malplej grave estis, ke la aŭgurita pluvega vetero bonvolis fordrivi ĝis la Fermo, kvazaŭ la dioj mem sune favorus nian aferon.

El organiza vidpunkto, eble plej gravis la elekto de nova prezidanto (vidu sube), kiun ĉi-foje elektis ne sole partoprenantoj en la Jarkunveno mem sed la tuta anaro de EAB pro la ebleco ankaŭ poŝte voĉdoni. Kaj la samaj membroj voĉdonis ankaŭ por amendoj en la konstitucio. La



BEA/EAB 100-jara



• *Supre: La festokukego por la centjariĝo de BEA/EAB, de kiu ĉiu partoprenanto ĝuis pecon kun glaso da vino aŭ io alia preskaŭ tiel bona.*

• *Maldekstre: Edmund Grimley Evans, lasinte la prezidantecon, bonvenigas la novan prezidanton de EAB, profesoron John Wells (dekstre), elektitan unuanime de la Jarkunveno. Edmund restas ano de la Administra Komitato. Meze sidas komitatano Helen Fantom, kiu gvidis la eksteran informadon pri la kongreso.*

aliajn rezultojn de la voĉdonado por la Administra Komitato kaj ŝanĝoj en la konstitucio de la asocio vidu sur paĝoj 4 kaj 5.



- Supre: *Oni sin preparas por la oficiala malfermo.*
- Dekstre: *Paul Gubbins prelegas pri la ĵurnalisto W.T. Stead kaj lian rolon en la brita movado de la frua 20-a jarcento.*
- Malsupre: *La ĉefgasto el eksterlando, Ziko Sikosek, en karakteriza prelepozio.*



Eŭropen?

Ĉi tiun numeron dominas la Brita Kongreso kaj Eŭropo pro la ĵusa baloto. Kiel ege plaĉe estas, ke elektigis la unua esperantisto al la Eŭropa Parlamento – vidu paĝon 9! S-ino Handzlik sendube havos okazon progresigi nian komunan aferon, sed ni restu realisme sobraj.

Kvankam ĉiam estas grave diskonigi, ke Esperanto pluvivas kaj prosperas, britaj parlamentanoj kredeble neniam kuraĝus are subteni Esperanton kontraŭ la angla – ĉar pri tio temus.

Kaj pri perspektivoj pli larĝaj ĉe Eŭropa Unio? Tie ni havos grandajn perspektivojn sole se ni antaŭe plenumos fundamentajn bezonojn, el kiuj reliefigas tri:

Unue, la komputistoj devos finfine ellabori por ĉiuj unu unuecan programaron, kiu tuj ebligos iun ajn senĝene tajpi la supersignitajn literojn.

Due, necesos lernolibro por progresintoj, kiu specife instruas la bezonatan lingvaĵon uzatan en la eŭropaj institucioj kaj politiko.

Trie – kiel jam provas progresigi UEA – neceso ellabori la mankohavajn teknikajn terminarojn – peza faka laboro.

Geoffrey Sutton

- Material for the next issue of *EAB Update* should be with the editor no later than 1 September.
- Materialo por la venonta numero de *EAB-Ĝisdate* atingi la redaktoron plej laste la 1-an de septembro.

EAB-Update / Ĝisdate is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.**

Tel. 0845 230 1887 or +44 (0)1782 372141

Fax / fakse: +44 (0)1782 372229

E-mail / rete: eab@esperanto-gb.org

Websites / ttt-paĝoj: www.esperanto-gb.org

www.esperantoeducation.com

□ Membership of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter £10 / Membriĝi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto pagas £10.

☆

□ **Material for Update** should be sent by e-mail, computer disk or hard copy to the editor / **Materialon por Ĝisdate** oni sendu rete, diske aŭ papere al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / rete: gsutton@macunlimited.net. Material may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

□ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto, and the English-language internet bulletin *EAB NetNews* / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto, kaj interrete la anglalingvan bultenon *EAB NetNews*.

☆

□ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / rete: uea@uea.org; www.uea.org)**, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

☆

□ EAB is also affiliated to the International League of Esperanto Teachers and the European Esperanto Union / EAB estas aliĝinta ankaŭ al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

☆

□ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimitaj en *EAB-Ĝisdate* ne nepre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

Andreas ĉe la britoj

Jen impresoj pri la kongreso de partopreninto Andreas Kück el Rechtenfleth, Germanio.

La 86-an Britan Kongreson de Esperanto partoprenis okdek ses esperantistoj, el ili ankaŭ mi kaj unuj pliaj ne-britoj. Mi spertis grandan bonvenon en la gastiglando.

Por mi, la kongres-partopreno estis bona ŝanco ligi Esperanto-aranĝon kun marvojaĝo. Mi pramsiĝe veturis de Cuxhaven al Harwich. De tie, mi trajne pluveturis al la kongres-urbo. Ekskursojn organizis partoprenantoj mem. Kune kun aliaj kongresanoj, mi piede esploris la urbon, startinte de ĝia longa nordmarborda promenejo.

En la kunvenejo, la hotelo Marlborough, mi ĉeestis interesajn prezentojn. En ili estis respondoj al demandoj kiel ekzemple: Kiu estis Ŝekspiro? Kiel progresas la projekto pri la enkonduko de Esperanto en kvar unuagradajn lernejojn en Gloucestershire ('Foreign Language Induction Programme', FLIP)? Kial la ĉielo estas blua?

Mi partoprenis ankaŭ gvidatajn konversaci-rondojn por lernantoj. En ili, la gvidanto instigis paroligi la rondanojn ekzemple jene: Li montris bildojn de britaj urboj ĉiufoje al nur unu el la konversaci-rondanoj. Tiu estis petita priskribi tion, kion li vidis. La aliaj devis diveni la urbon. Aŭ: La gvidanto metis demandon, kiun la rondanoj devis respondi, diskutante la aferon. Ekzemple: Kio okazis en februaro 1866 kaj denove okazos nur post 2,5 milionoj da jaroj? (Respondo: la foresto de la plenluno dum unu tuta kalendarmonato kaj la apero de ĉiufoje du plenlunoj dum la antaŭa kaj posta kalendarmonato.)

Aldone estis apartaj salonoj por konstanta babilado kaj libroservo. Plue estis ludoj, praktika sesio de mansonorilo, gvidataj diskutrondoj kaj gaja lingva-muzika kvizo. Tiu estis



• Supre: Novaj geprezidantoj: dekstre staras prof. John Wells, ano de la Brita Akademio, kiun la membroj elektis nia nova prezidanto, kaj maldekstre staras Petra Fantom, la nova prezidantino de Junularo Esperantista Brita (JEB).



• Supre: Okaze de la centjariĝo de EAB, la Loka Kongresa Komitato hejmbakis kukegon, kiun honoris fama Esperanto-verkisto d-rino Marjorie Boulton per la unua tranĉo ankaŭ okaze de sia 80-jara datreveno. Dekstre staras Paul Gubbins.

• Malsupre: Kongresanoj aŭskultas prelegon.



okazigita de la germana gast-preleganto Ziko Marcus Sikosek, aŭtoro de la libro *Esperanto sen mitoj*. Post la sabatvespera bankedo, li amuzis la ĉeestantojn per ne tro serioze kompreninda rakonto pri la komenciĝo de Esperanto. La dimanĉon, mi profitis de la ĵus antaŭe re-ekstigita dumsomera prametligo de Felixstowe al Harwich por ekskurso sur la rivero Orwell kaj



per tio, samtempe por la unua vojero de la hejmvoyaĝo.

Andreas Kück

AGM 2004

EAB's 27th Annual General Meeting was held on 1 May in the Marlborough Hotel, Felixstowe, during the British Congress. Before around fifty members, trustees Edmund Grimley Evans (President and meeting chairman), Joyce Bunting (Hon. Treasurer), Geoffrey Sutton (Hon. Secretary), David Bisset, Helen Fantom, Derek Tatton and John Wells were present.

The Trustees' Report was published in issue 25 of *EAB Update*, together with the Financial Report, and the AGM Agenda was sent out as an insert in the same issue; the Minutes of the previous AGM and copies of the Annual Financial Statement were distributed at the meeting.

Edmund Grimley Evans opened the meeting by reading out the names of members who had died during the past year. There followed a minute's silence.

Edmund proposed to add an item to the Agenda, enabling the vote on the constitutional amendments. The lack of the item was an oversight by the Secretary but it had been fully set out in *EAB Update*, and comprehensive proxy voting-forms, covering the constitutional options, were sent out with *La Brita Esperantisto* (i.e. to all members with voting rights). Helen Fantom read out a statement by Ian Fantom concerning this oversight. The Chairman's proposal was seconded by Eric Walker and accepted unanimously by a show of hands.

Apologies for absence were received from Ian Fantom, June

Miles, Grahame Leon-Smith, Stephen Thompson and Jack Warren.

Joyce Bunting, presented a summary of the Trustees' Report as well as the Financial Report. Both were approved unanimously. It was also agreed to keep subscription rates unchanged.

All the nominees were elected, and all the amendments to the Constitution accepted.

While the votes were being counted, members discussed the Resolution proposed by Ian Fantom and Stephen Thompson (*EAB Update* No.25). Helen read out a statement by Ian Fantom, and the full text of the resolution was read out. Joyce Bunting summarised the Management Committee's reply, previously printed in the same issue of *EAB Update*. Paul Gubbins pointed out that EAB have considered the resolution so we had already done what the resolution requests. Eric Walker advised voting against the resolution as a new type of organisation is to be proposed by the Charities Commission. Kate Hall agreed that we should await the new Charities Act. Bill Walker commented on the subject of debt, stating that only

Votes for the Committee:

David Bisset	FOR 79	ABSTAIN 7	AGAINST 4
Joyce Bunting	FOR 88	ABSTAIN 1	AGAINST 1
Helen Fantom	FOR 73	ABSTAIN 11	AGAINST 6
Edmund Grimley Evans	FOR 84	ABSTAIN 4	AGAINST 2
Geoffrey Sutton	FOR 81	ABSTAIN 9	AGAINST 0
Derek Tatton	FOR 85	ABSTAIN 4	AGAINST 1
John Wells (cand. for Pres.)	FOR 88	ABSTAIN 1	AGAINST 0

Votes for amendments to the Constitution:

(1)	FOR 77	ABSTAIN 7	AGAINST 5
(2)	FOR 75	ABSTAIN 10	AGAINST 4
(3)	FOR 73	ABSTAIN 13	AGAINST 2
(4)	FOR 78	ABSTAIN 7	AGAINST 3
(5)	FOR 82	ABSTAIN 6	AGAINST 1
(6)	FOR 72	ABSTAIN 14	AGAINST 3
(7)	FOR 82	ABSTAIN 4	AGAINST 3
(8)	FOR 74	ABSTAIN 12	AGAINST 2

Michael Seaton and Bill Simcock were proposed and accepted unanimously as election vote-counters. There followed the voting for members of the Management Committee and the proposed amendments to the Constitution, which was carried out by secret ballot. Many thanks to Michael and Bill for undertaking the laborious task of totting up the votes, the results of which they read out at the end of the meeting.

the trustees have responsibility and liability. It was agreed that it was an interesting point whether members were in some way liable. The Treasurer replied that EAB does not carry any substantial debts, and financial matters are dealt with in the simplest possible manner. However, the Management Committee agreed that it would nevertheless look into the matter further in a way that would not incur unnecessary legal fees. Eric Walker added

that he disliked the idea of a registered company as members would then have to be registered, and there would be additional administrative burdens. The resolution was voted on by a show of hands: None for, and 6 abstentions.

During the traditional 'Comments and suggestions from the membership' there was a complaint that there was not enough informative literature to hand out. Helen Fantom explained the present situation, adding that more was on the way. It was asked what plans there were for the EAB website. Helen replied that the matter was being discussed; Matthew Tellier was praised for the site on education. Eric Walker spoke on his plan to revive the 'Konsila Komisiono' as a moderated informal internet discussion group; the Administrative Committee of EAB had already asked Eric to go ahead with this. Helen asked members to contact her in order to help promote Esperanto as a 'bridge language' in the European elections. Due to the demise of several federations and groups it was suggested that members meet in informal groups for a meal. □



• Plej supre: La geaktoroj – La Verda Ranaro – viciĝas por akcepti aplaŭdon pro sia prezento de la nova teatraĵo de Paul Gubbins Dialogaro unuvoĉa, kiu prilumis plurajn pionirajn figurojn el la unuaj jaroj de la brita movado.

• Supre: Ero el la teatraĵo mem.

• Maldekstre: Ankoraŭ pli da kukotranĉado helpe de spertulo pri la fako.

* Pliaj fotoj de la Brita Kongreso estas videblaj ĉe la ttt-paĝoj www.BritishEsperantoCongress.co.uk.

London Language Show gets go-ahead

Following the AGM, the Management Committee sat down to business. Here are some of the more important points from this meeting and the July meeting.

The only changes to offices, apart from the new president, John Wells, was the election of the two vice-presidents: David Bisset and Edmund Grimley Evans.

EAB will take a stand at the **London Language Show (5-7 November)** at Olympia, entrance No. 2, Hammersmith Road), despite the event now taking place over three days and costing participants a considerably sum of money. An official has since come to talk to the Publicity Subcommittee, and the 2 x 3m stand is in the planning stage. Volunteers please contact Helen Fantom at: helen@mintex.demon.co.uk.

A new general publicity folder 'Introduction to Eo' is in the final planning stage.

It is suggested that Jim Voiel's good work be enhanced with an agreement running to August next year.

The Euro-Elections were discussed prior to sending information to candidates in mid-May (p.8).

The first draft of Bessacarr's information booklet on Esperanto for primary-school children and parents is awaited.

The Liverpool University lectureship in Esperanto has been a concern for some time. Derek Tatton has undertaken the task of finding a practical solution, and negotiations with the university may bear some interesting fruit before the year end.

The Principal of Wedgwood Memorial College has asked that the College's own website be linked to EAB's educational site, and an Esperanto-language leaflet on the Summer School is being considered to attract overseas students. There is also the possibility of obtaining external funding for day courses for local people.

The **new CD *Verdaj Voĉoj***, prepared by Paul Gubbins, will soon be on sale at £8.

As few British Esperantists are

travelling to China, the Committee have appointed Paul Gubbins to represent EAB at UEA's Committee meeting during the World Congress.

The revised edition of *Mil Unuaj Vortoj* is already printed and about to be delivered.

The communal library project has run up against difficulties, but an amended project is being pursued.

An information display for visitors to the Butler Library is being undertaken. Our leaflets disappear from there at an interesting rate.

The **British Library** have recently expressed high-level interest in acquiring good-quality Esperanto books, which the Library Subcommittee will report on later.

EAB's new constitution has been approved by the Charities Commission. A printed version is being prepared.

For the latest on EAB's AGM 2005, see page 10 (top left). □



• Supre: *La praktikantoj de la arto ludi mansonorilojn, gvidataj de Roy Threadgold. Ili produktis la solan malharmonion dum la Brita Kongreso, kvankam post tiom malmulta praktikado ili plene meritis la aplaŭdon pro sia prezento.*

• Maldekstre: *John Wells prelegas pri Juan Régulo Pérez (1914-93) kaj la fama eldonejo Stafeto.*

Esperanto at the European Parliament

Admittedly it was only for one day (9 December 2003), but so far as I know it was a first: one of the interpreters' booths (the Portuguese one) in the European Parliament in Brussels was handed over to an Esperanto interpreter, and he translated the whole day's proceedings. The event was a conference of the Italian Radical Party, and we all owe a vote of thanks to Italian Radical MEP Giancarlo Dell'Alba, who made the arrangements. The interpreter was Tsirimokos Angelos, who is from Greece but lives in Italy. He did a fantastic job, working entirely on his own for seven hours, while the EU interpreters change over every twenty minutes.

I was there with fifty other Esperantists from a range of European countries as a guest of the Italian Radical Party. Amongst many other things, the congress saw the launch of an exciting initiative concerning Esperanto. The Esperanto Radical Party, which is affiliated to the Radical party – has persuaded the Italian Minister for Education, Letizia Moratti, to promote an experiment with Esperanto in European Schools. There have, of course, been many experiments with Esperanto in education – most have met with success and then been ignored.

The Minister will put the proposal to the other ministers of education in the 25 member states. Her preferred option is to focus on teaching the language to 16-to-18-year-olds on the grounds that they will soon be fully fledged citizens of the EU: old enough to travel and meet their contemporaries. Of course, the downside of this choice is that young people of that age have all

Salutletero de la Prezidanto de UEA okaze de la jubileo de EAB

Britoj bleku ankoraŭ pli forte!

Karaj membroj de la lokaj kluboj en Britujo,

Mi unue danku la estraron de EAB, kiu bonvolis doni al mi la eblecon alparoli vin okaze de la jubilea festo de EAB.

De longa tempo mi serĉas la fonton de citaĵo de Zamenhof, kiu laŭ mi iam diris, ke 'kiam la brita leono blekos, tio estos granda helpo por nia afero internacie'. Eble mi nur imagas tion, aŭ eble iu el vi informos min pri la fonto.

Ĉiokaze, mi estas konvinkita, ke Zamenhof pravis, se li diris tion. Nuntempe ni vivas en situacio, en kiu tio, kio okazas en anglalingvaj landoj, estas aŭtomate pli grava ol tio, kio okazas en ekzemple Italujo au Slovakujo. Pensu pri tio, kio okazis en la mondo, ekster Britujo aŭ Usono, pro la artikoloj en anglalingvaj gazetoj pasintan jaron. Oni represis ilin ĝis Tajvano.

Pro tio la monda Esperanto-movado havas grandan intereson havi fortan movadon en anglalingvaj landoj kaj aparte en Britujo. Tiu forta movado estas vi, la lokaj grupoj en Britujo, kiuj laboras celkonscie en la kadro de EAB. Ne lasu vin esti fortirataj el la laciga laboro de sirenoj kaj de ŝajnaj profetoj. Esperanto antaŭeniro ĉefe pro la laboro je loka nivelo de homoj, kiuj informas, instruas kaj ankaŭ simple uzas la lingvon. Ĉio cetera, Bruselo, Unuiĝintaj Nacioj, la Nobel-premioj, estas grava, sed ne tiom, kiom tio, kion vi faras.

EAB certe helpos vin, sed vi sentu la tutan fieron esti esperantisto kaj labori por pli justa mondo. Ni ne komercas pri lingvoj, ni volas helpi homojn koni aliajn homojn, respekti ilin, kaj kompreni, ke ĉiuj homoj en la mondo estas samvaloraj.

La tutmonda esperantistaro kaj mi mem estas kun vi en ĉi tiu festa momento kaj estos kun vi ankaŭ morgaŭ, kiam vi rekomencos obstine vian laboron por Esperanto.

Tre amike

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA

got major exams coming up. However, within the context of the English educational system I think this proposal could go ahead under the heading of Citizenship and General Studies.

Of course, some of us are already teaching 16-to-18-year-olds, either through clubs or through the Free Postal Course or the internet. I hope we will be able to link in with the ERA project somehow as it would give us more credibility and present our young beginners with plenty of opportunities to speak Esperanto with other young Europeans.

ERA's other project concerns teaching Esperanto as an induction language in primary schools. Some of you may remember their previous efforts in this direction with the Unesco-backed project Fundapax, which produced an excellent primary-school textbook, *Ludu kun Ni*. They are hoping to obtain Unesco backing for this project too. Their scheme could link in well with the project I am currently piloting in primary

schools in Gloucestershire. I shall continue to pursue this project anyway. If I can tie in with other schools in Europe through a Unesco-backed scheme, that would be a bonus.

Ivan Buduso, Professor of Esperanto in the University of Budapest, is involved in both projects. In Hungary, pupils take a school-leaving exam at eighteen, similar to the German *Abitur*. Since 1995, it has been compulsory to study a language for this exam, and Esperanto is one of the options. In 1995, a total of 602 pupils opted for it; by 2002 the number had grown to 7,087. Coincidentally, it occurred to me that 1995 was the last year of this country's Esperanto GSCE! There was some talk a year or two ago about President Chirac allowing Esperanto to be one of the language options for the *Baccalaureat* – maybe other countries can be persuaded to follow Hungary's excellent example.

Elizabeth Stanley

La brita eŭropa balotado kaj ni

Instigite de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), kiu volis kunordigi tian kampanjon en ĉiuj EU-landoj, EAB sendis cirkuleron al multaj kandidatoj por la Eŭropa Parlamento.

En la cirkulero ni demandis:

- 1) Ĉu vi trovas tion morale akceptebla, ke pli kaj pli da postenoj en EU-institucioj estas reklamataj kiel nur por denaskaj parolantoj de la angla?
- 2) Ĉu vi pensas, ke EU devus subteni esploradon pri la eblo apliki neŭtralan pontolingvon por certigi pli justan traktadon de la naciaj lingvoj de Eŭropo?

Cetere ni invitis al la kandidatoj subskribi jenan deklaron:

‘Mi, _____, kandidato en la balotado por la Eŭropa Parlamento en Britio en junio 2004, subtenos kaj defendos la rajton de EU-civitanoj ĝui egalan traktadon de siaj naciaj lingvoj.’

El la 87 britaj reprezentantoj en la Eŭropa Parlamento, 73 estis kandidatoj por reelektiĝo. Al tiuj ni sendis la cirkuleron papere.

Poste ni sendis la cirkuleron retroŝte al 174 retadreso de aliaj kandidatoj. Estis facile akiri retadresojn de ĉiuj konservativaj kaj liberaldemokratiaj kandidatoj, kaj de multaj kandidatoj de la Verda Partio, sed la Laborista Partio ne reklamis adresojn de siaj kandidatoj. Ĉirkaŭ 36 retadreso donis eraron kaj supozeble ne atingis la adresiton.

Ĉirkaŭ 25 respondis

Venis ĉirkaŭ 25 respondoj de kandidatoj, plejparte retroŝte: por 7 aŭ 8 de kandidatoj konservativaj, liberaldemokratiaj kaj verdaj, 2 de laboristaj kandidatoj, kaj 1 de kandidato de SNP. Venis ankaŭ du respondoj de partiaj reprezentantoj.

Inter la plej inteligentaj respondoj estis jenaj:

Richard Corbett (laborpartiano, reelektita), kiu iam faris paroladon ĉe kongreso de TEJO, atentigis, ke estus kontraŭleĝe reklami postenojn en EU-institucio nur por anglalingvanoj, kaj petis ekzemplojn de tiaj reklamoj. (Estas listo ĉe <http://lingvo.org/diskriminacio/>, sed la postenoj estas ĉefe en neregistaraj organizaĵoj.)



Caroline Lucas (verdulo, reelektita), rimarkis, ke antaŭ nelonge okazis voĉdonado en la parlamento pri amendo mencianta Esperanton. (Nur unu alia kandidato, ankaŭ verdulo, menciis tiun ‘Recital D’.) Ŝi voĉdonis por la amendo, ĉar laŭ ŝi ‘it is important to keep our options open with regard to how best to preserve Europe’s linguistic heritage’.

Clive Sneddon (liberaldemokrato, ne elektita), respondis, ke li ne kontraŭas la uzadon de neŭtrala lingvo, sed ke li ne konsentas kun la deklaro, ĉar ĝi ŝajnas aludi nur la naciajn lingvojn de EU kaj tiel ekskluzivas la unuajn lingvojn de iuj civitanoj. Ankaŭ li petis pliajn informojn pri la postenoj reklamataj nur por anglalingvanoj. (Cetere, li menciis, ke li ĝis antaŭ nelonge havis kiel kolegon la esperantiston Chris Gledhill. Eble li tiel informiĝis pri Esperanto.)

Estus malafable nun sekvigi liston de la ‘malplej inteligentaj’ respondoj, speciale ĉar ĉiu respondinto havas almenaŭ tiun meriton, ke li aŭ ŝi entute respondis nian cirkuleron, pro kio ni dankas, sed la sekvaj respondoj estas atentindaj, ĉar ili montras tipajn miskomprenojn:

Roger Helmer (konservativulo, reelektita) skribis: ‘I take the view that individuals should make their own choice of what language they want to speak. The problem for you is that more choose to speak English than Esperanto.’

Tri miskomprenoj

Tiu respondo ilustras eble eĉ tri miskomprenojn:

- ke homoj povas nun libere elekti la lingvon, kiun ili uzas, kiam fakte multaj homoj estas devigataj uzi fremdan lingvon, ĉefe la anglan;
- ke esperantistoj volas forigi tiun liberecon, kiam fakte ili havas tute malan celon;
- ke la nuna lingvoreĝimo estas problemo specife por esperantistoj, kiam fakte ĝi estas problemo por la tuta socio, kiun esperantistoj volas solvi.

Robert Evans (laborpartiano, reelektita) skribis: ‘Robert is not and has never been in favour of the promotion of Esperanto. Please do not list him as one of your supporters [...]’. Tie la miskompreno estas, ke nia cirkulero demandis pri tio aŭ petis tian subtenon. Fakte la teksto de nia cirkulero tute ne menciis Esperanton. Eble Robert Evans estas rabia kontraŭesperantisto, sed eble li agaciĝis pro aliaj leteroj ricevataj, aŭ lia sekretario sendis ŝablonan respondon faritan por alia letero.

Lecionoj por ni povas esti:

- Plimulto de politikistoj (ankaŭ Robert Evans, sed eble ne Roger Helmer) volas subteni naciajn kaj minoritatajn lingvojn kaj eviti la devigon uzi fremdan lingvon.
- Al politikistoj necesas zorge prezenti Esperanton kiel rimedon por atingi tiujn celojn, ĉar oni tre facile supozas, ke esperantistoj interesiĝas nur pri trudado de Esperanto.

Edmund Grimley Evans

☞ Se vi havas pliajn informojn pri la kandidatoj, iliaj opinioj aŭ aliaj interesajoj, bonvolu informi al Helen Fantom (tel. 01635 38592; helen@mintex.demon.co.uk).

Dankletero de la unua Esperanto-parolanta deputito de la Eŭropa Parlamento



Karaj,

Dankegon pro la gratulsalutoj okaze de mia elekto al la Eŭropa Parlamento, kiujn mi ricevas ĉiuhore. Ili venas de samideanoj el la tuta mondo. La intereso pri mia persono nun fariĝis pli granda ol mi povis imagi. Dankegon al vi ĉiuj. Pro multeco da mesaĝoj mi ne kapablas detale respondi al ĉiu. Jen la komuna letero, en kiu mi provos respondi al starigitaj ĝeneralaj demandoj.

Pri Mi

Mia nomo estas Małgorzata Handzlik, el Pollando. Esperantistoj nomas min Margareta. Mi estas edzino de Georgo Handzlik, la Esperanta kantisto, verkisto, eldonisto kaj instruisto.

Esperanton mi parolas dudek jarojn.

Mi vizitis Universalajn Kongresojn en Berlino kaj Mondperliero, krome multajn lokajn aranĝojn.

Dum du monatoj mi kun mia familio estis en Brazilo invitataj de gesinjoroj Grattapalia, el Bona Espero.

Mia ttt-paĝo: www.malgorzatahandzlik.com

Politiko

Mi neniam agis en politikaj partioj. Nur dum la kampanjo mi aliĝis al Civitana Platformo (Platforma Obywatelska)

En la Eŭropa Parlamento mi agos en la granda frakcio EPP (Eŭropa Popola Partio).

Kelkaj samideanoj skribis, ke mi estas la unua esperantisto-membro de la Eŭropa Parlamento. Mi ne kontrolis tion.

La kampanjon ni faris dum du monatoj kaj mi gajnis unu el plej bonaj rezultoj en la lando.

Esperanto por EU

Dankon pro sugestoj, ke mi zorgu en la parlamento pri Esperanto. Tio evidente estas unu el miaj intencoj. Por efikdone agi mi nun volas aliĝi al la Komisiono pri Kulturo Edukado, Junularo kaj Sporto, kiu inter la aliaj okupiĝas pri lingvoj. Tio fakte ne estas facila tasko, ĉar estas multaj volontuloj al la komisiono. Kaj la decido apartenas ne nur al la parlamentano, sed ankaŭ al la partio.

Krom salutoj venis al mi kelkaj mesaĝoj kun proponoj kunlabori internacivele pri kulturo. Venis al mia retadreso ankaŭ kelkaj gratuloj al Civitana Platformo pro elekto de esperantistino al EP. Mi prezentos ilin al la estroj de la partio, eble tio subtenos miajn strebojn eniri la Komisionon pri Kulturo.

Krom Esperantaj amikoj en ĉiuj eŭropaj landoj, mi havas aliajn kompetencojn por la Komisiono pri Kulturo, Junularo Edukado kaj Sporto: jam dudek jarojn mi gvidas radion, mi fondis instituton por instrui instruistojn, mi fondis lingvolernejon, mi profesie laboris en la skolta movado

Mi estos dankema pro ĉiu mesaĝo kun propono kunlabori sur kultura kampo internacia.

Se mi eniros la Komisionon pri Kulturo, mi havos realan ŝancon pledi por Esperanto. Tiam volonte mi diskutos kaj renkontiĝos kun ĉiuj, kiuj havas spertojn pri informado por Esperanto ĉe la parlamento.

Sincere

Margareta Handzlik, Eŭrodeputito

Lernejoj Eŭrokluboj kaj la ttt-paĝo 'Europonto'

Oni invitas viziti la prieŭropan ttt-paĝaron www.europonto.org.

Ĉe polaj lernejoj agas 4 800 lernejoj eŭrokluboj. Instruisto

patronas ĉiun klubon. Oni demandas, ĉu ankaŭ en Britio ekzistas similaj lernejoj eŭrokluboj. Oni volonte publikigus iliajn adresojn por stimuli internacian kunlaboron. Estas listo jam en tridek tri eŭropaj lingvoj.

Krome, oni volonte publikigos adresojn de ttt-paĝaroj de landaj, regionaj kaj lokaj societoj, kiuj posedas Esperantlingvan version de sia paĝaro.

Kontaktu s-ron Edward Wojtakowski (Vroclavo, Pollando; rete: europonto@europonto.org). □

• Jarkunsido de EAB 2005

Tio okazos sabaton, la 7-an de majo, ĉe la Baptista Preĝejo en Bloomsbury, Londono, inter 13h00–17h00. Eventuale okazos prelego en la mateno, sed EAB volonte akceptas sinproponojn pri prezentaĵoj, pri kio bonvolu kontakti kun Joyce Bunting (tel. 01582 760564; joyce.bunting@btconnect.com). Krome eblos ĉeesti la programon de Londona Esperanto-Klubo dum la vendreda vespero.

• Former EAB member now ambassador to Lithuania

Marie Louise Vanherk – a member of EAB while working at the Belgian Embassy in London about six years ago – is now the Belgian Ambassador to Lithuania. Perhaps, when the 2005 World Esperanto Congress (23–30 July) takes place in Vilnius, she will be able to say hello to her old friends from Britain who take part in the congress.

• EAB NetNews revived

Eric Walker has volunteered to restart *EAB NetNews*. If you want to receive it, inform him on line: ericwalker@gn.apc.org

• Italaj partioj subskribis

Itala Esperanto-Federacio (IEF) anoncis, ke du partioj, Komunisti Italiani kaj Repubblicani Europei, jam subskribis ĝian komunan dokumenton pri defendo de lingva plureco en Eŭropo. Poste la Radikala Partio sendis pli ol aproban leteron pri la afero kaj aparte pri Esperanto. Venis ankaŭ skriba respondo de Partito della Rifondazione Comunista, subskribita de la sekretario, Fausto Bertinotti, kiu en longa letero klarigas, ke la proponita dokumento estas ‘grava kaj aprobinda’ kaj poste klarigas longe la konceptojn pri la savo de ĉiuj lingvoj kaj de ĉiuj kulturoj kaj proponas komunajn aranĝojn. Kvine, subskribis la proponitan dokumenton dum persona renkontiĝo kun la prezidanto de IEF Partio Margherita (centra-maldekstra). La deklaro de FEI estas konsultebila ĉe: www.lingvo.org/eo/4/788, -790 kaj -789.

• Course statistics

It is reported to EAB’s Management Committee that 19 tutors were serving 70 current students of the updated Free Postal Course since 1 November 2003. Thirteen students have already finished this course, and of these, 3 have enrolled on the *Elementary ...!* course and 5 have become members.

The *Elementary...!* course is complete; 61 sets were sold up to mid-June. There are 47 current students, 2 have finished, 2 dropped out; 10 required no tutor. There are 18 tutors.

The ‘Accelerated’ course is now updated, with 6 students currently taking it. There are 8 tutors.

Five students are currently taking the ‘Advanced’ course, which has 5 tutors available. This course is the next to be updated.

A section on history and culture has recently been added to EAB’s educational website www.EsperantoEducation.co.uk, including audio extracts (MP3s) of a couple of UEA’s new CDs.

• Florenca UK, 2006

Informoj pri la Universala Kongreso de Esperanto de 2006 (29 julio–5 aŭgusto) en Florenco, Italio, jam troveblas ĉe la ttt-paĝoj www.ukflorenco2006.it. Aliaj turismaj informoj videblas ĉe www.firenzeturismo.it.

• Premioj el Ukrainio

‘Ni kunorganizas konkurson ‘Tago de Eŭropo’ okaze de la 30-jariĝo de nia Esperanto-klubo ‘Ora Pordego’ en Kievo. Bonvolu sendi manfaraĵojn, rakontojn, fotojn ks. pri viaj klubo, urbo aŭ lando. Vi nepre ricevos dankleteron kaj eble premiojn’ skribas s-ino Svetlana Pogorelaja, a.K. 54, UA-03035 Kijiv-35, Ukrainio.

• Semajnfino en Nederlando

Esperanto Nederland organizas sian semajnfinan renkontiĝon por la 22-a ĝis la 24-a de oktobro 2004. Ĝi nomiĝas Faulhaber-semajnfino honore al la fame konata Frits Faulhaber, aŭtoro de la stilkonsililo *Ne tiel, sed tiel ĉi*. Ĝi okazos en la kongresejo Mennorode en la vilaĝo Elspeet,

meze en Nederlando, apud la urbo Apeldoorn en la arbarriĉa regiono *De Hoge Veluwe*. La temo de la renkontiĝo estas ‘Kiom granda estas Eŭropo?’ Ni elektis la temon pro la pligrandiĝo de EU. Eblas aliĝi por du-nokta restado (140 eŭroj) aŭ unu-nokta restado (90 aŭ 95 eŭroj). La programo enhavas prelegojn, i.a. de Dafydd ap Fergus de la Brusela Komunikadcentro kaj Ingeborg van Dijk pri interŝanĝoj de lernejanjoj. Ne mankos muziko kaj kantado. Dum la tuta semajnfino funkcios la Libro-

An electronic discussion group specifically for EAB members and potential members

EAB used to have a ‘Konsila Komisiono’ – a group made up of representatives from the federations, which met several times a year. Its role was to act as a conduit between the Management Committee and the members. It was quite expensive to run and did not seem worth the expense, so it closed down a few years ago.

Now we are in the age of electronic mail discussion groups. These can function quite well and at virtually no cost (no cost that is once you have bought a computer, software and followed a steep learning curve!). There already exist several electronic discussion groups for Esperantists but their subject ranges are quite wide and because they are unmoderated (uncensored) they can cause offence to people.

I feel there is need for a discussion group that restricts itself to discussing how we can promote the idea of Esperanto in general and increase membership of EAB in particular. It would not discuss the language itself as there are other groups for that.

If you would like me to include you in this discussion group when it starts, please register with me by sending your name and e-mail address to me at:

<ericwalker@gn.apc.org>.

Eric Walker

servo de UEA. Aliĝiloj estas haveblaj de s-ro Remment Balk, van IJsendijkstraat 271, NL-1442 CM Purmerend; rete: r.balk@wanadoo.nl.

• Bulonjo 2005

La internacia renkontiĝo 'Boulogne 2005' – kiu enkalkulas tuttagan ekskurson organizatan de EAB – okazos de la 25-a ĝis la 30-a de marto. Ĝia ttt-paĝaro www.boulogne2005.com informas pri la programo, historio, urbo kaj organizantaj asocioj. Pliaj detaloj aperos en ĉi tiu bulteno ekde la venonta, oktobra numero.



• 'You and Yours'

This BBC Radio 4 programme featured an unusually intelligent piece on Esperanto as a possible solution to the language problems of the European Union at 12:04 on Friday, 4 June. It may still be available via the BBC's internet service.

• Renkontiĝo en Aylsford

La tradicia Amikeca Renkontiĝo okazos inter la 24-a kaj 28-a de septembro en Aylesford, Kent. La programo estas plena je prelegoj, diskutoj, ludoj kaj amuzaĵoj. Petu aliĝilon de Anica Page (tel. 01908 564004) aŭ de Sally Phillips (tel. 01424 460556).

• Libro de Harold Brown

Post la forpaso de Harold Brown, Kerstin Rohdin skribis: 'Li postlasas du librojn verkitajn en la angla. Pro tio mi volas presigi etan eldonon de ili kaj petas al vi, kiuj volas memori Harold per legado de liaj vortoj anonci vin al mi por antaŭmendi liajn librojn, tiel ke mi povas kalkuli la eldon-nombrom. La titoloj estas: *Always Summer* (ĉ. 100 p.), *Five Self-portraits* (ĉ. 220 p.). La prezo por ambaŭ kune estas ĉ. 250 svedaj kronoj (plus sendokosto). Ambaŭ libroj en diversaj manieroj temas pri la arto vivi. Ili estas skribitaj en facila, flua, intima angla lingvo.' Bonvolu kontakti s-inon Kerstin Rohdin,

Por ke lingvo estu intertriba, ne sufiĉas nomi ĝin tia, oni devas ankaŭ instrui ĝin!


En la mondo – kaj en Afriko – oni multe parolas pri tribismo kaj pri la malbonaj sekvoj de tribismo, kiuj interalie estas malpaco, streĉitaj rilatoj kaj eĉ malferma milito. Ni provas helpi afrikajn landojn, en la kadro de samcelaj klopodoj de Unesko, venki tribismon.

Nia rimedo ŝajnas tre bona por permesi rektan interkontaktadon inter anoj de malsamaj gentoj en la koro de Afriko, kie militoj lastatempe faris multajn viktimojn. Nia projekto estas *Lingvo de paco – Ururimi rw'Amahoro*. Temas pri kampanjo, kiu celas kunligi esperantistojn el la malsamaj militantaj gentoj de Burundio, Ruando kaj Orienta Kongo (la tiel-nomata regiono de la grandaj lagoj), kiuj instruas Esperanton al siaj samgentanoj por organizi post unu aŭ du jaroj grandan intertriban, interetnan kaj interlandan renkontiĝo de esperantistoj en Buĵumburo, Burundio.

Instruado de Esperanto jam okazas surloke. Nun aperis instruistino preta vojaĝi tien, ne sen personaj riskoj, ĉefe por instrui Esperanton pli bone al la instruistoj. Ni devas *nur* pagi la flugbileton kaj la ceterajn kunligitajn kostojn. Ni estas la Fondaĵo Espero, konto 'Lingvo de Paco' ĉe UEA, kiun vi jam multe subtenis en la pasinteco. Ni esperas, ke vi faros tion ankaŭ nun por ebligi ĉi tiun agadon.

Renato Corsetti

Ps. Se vi sendas monon al UEA por la Fondaĵo Espero, bonvolu klare mencii sur la pagilo 'Fondaĵo Espero – Lingvo de Paco'. Pagmanieroj troveblas en *Jarlibro de UEA*, p.33, kiel ekzemple al la landa peranto. Unu el la pagmanieroj estas: Poŝtbankkonto 37 89 64, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam. IBAN: NL24PSTB0000378964 (kvar nuloj, ne majusklaĵ literoj 'O') SWIFT: PSTB NL21. Mencio de IBAN kaj SWIFT kodoj permesas senpagan transkontigadon en Eŭropo.



Lernantoj de Esperanto en Buĵumburo, Burundio



Carvargränd 6, SE-579 30
Högsby, Svedio. Tel. 00 46 (0)491
20461. Rete: kerstin.rohdin@
swipnet.se.

• Kampadi Esperante?

El Francio venis sugesto de Luc Guers. Li pretas viziti ĉiujn grandajn kampadejojn de sia departemento por proponi al ties mastrumantoj ekuzon de Esperanto. Tion li pretas fari senpage sed proponas tamen partoprenon en la elspezoj. La ideo eventuale uzeblus aliloke. Se vi interesiĝas pri iu aspekto de la afero, kontaktu al Henri Masson (rete: esperohm@club-internet.fr).

• New Barlaston picture postcards now available

In spite of the ease and speed of e-mails, people appreciate a handwritten card now and then. Send your friends and acquaintances a colourful postcard, new from EAB, depicting 'Esperanto in Britain'. The

pictures show our office, Esperanto House at Barlaston; Wedgwood Memorial College, home to our residential courses; our Esperanto sculpture; the Butler library; and Esperantists enjoying a walk during the Summer School. Cards can be ordered from the EAB office (page 2) at 5 for £2, 10 for £3.45 or 20 for £5.75 (including p&p).

• Paska renkontiĝo familia en Germanio

La 21-a Printempa Semajno Internacia de Germana Esperanto-Asocio okazos en la vilaĝo Mücke, Meza Heslando, inter la 21-a kaj 28-a de marto 2005. Pliaj detaloj haveblas ĉe www.esperanto.de/psi aŭ de s-ro W. Bohr, Johannes-Kirchweg-Str. 11, D-53474 Bad Neuenahr – Ahrweiler, Germanio; rete: psi@esperanto.de.


• Nova ĉina ondolongo

En Eŭropo Esperantaj elsendoj de Ĉina Radio Internacia nun

aŭskulteblas inter 19h30 kaj 20h30 UT je la ondolongoj 30, 36 kaj 25,40 (kHz9880 kaj 11810).

• Adult Learners Week

Next year, Adult Learners Week takes place from 15 to 21 May. See the website www.niace.org.uk, which, among other things, invites organisations to contribute to their year-round calendar of events in the UK. EAB is in the process of including its courses in the listings. If you know of any other appropriate Esperanto event during the week, this could be publicised in this context. (Jim Voiels / jim@voiels.fsnet.co.uk).



Esperanto en Britio – Wedgwood Memorial College – Barlaston

• Raporto pri la manifestacio 'Europa Bunto' 2004

Malgraŭ la distanco kaj veteraĉo, pli ol 300 homoj kunvenis en Strasburgo la 9-an de majo: la manifestaciintoj venis el ĉiuj partoj de Francio sed ankaŭ pluraj alvenis el Germanio, Belgio, Svislando, Britio kaj eĉ Serbio.

La alveno de la busoj el Bretonio kaj el Parizo estis aparte rimarkita, kaj ĉiu kunportis siajn banderolojn. La rendevua loko estis facile videbla dank' al la bunta balonego, kiu superis la Placon de la Universitato.

Post bonvenigaj vortoj, pluraj partoprenantoj salutis la publikon en sia gepatra lingvo. Oni tiam menciis la nomojn de la tridek tri asocioj, kiuj subtenis la manifestacion. Sekvis koncerto de jOmO.

La manifestacio ekiris cele al la Eŭropa Parlamentejo. La kunirantaro en la aleo de la Robertsau estis sufiĉe impona pro ties longeco kaj ties multeco da

Se vi povos helpi/aktivi ĉe la *Eŭropa Forumo*, kiu okazos ĉe Alexandra Palace en Londono la 15-an kaj 16-an de oktobro, bonvolu anonci vin al Helen Fantom (tel. 01635 38592; rete: helen@mintex.demon.co.uk) aŭ al Bill Simcock (SATEB) (retpoŝte: WHSimcock@aol.com).

banderoloj. Eblis aŭdi interalie la sloganon «Eŭropo – ne al diskriminacio, jes al komunikado!».

Ankoraŭ estis bonnivela debato ĉe la Eŭropa Parlamentejo. Ĝin animis Gilbert Stammbach, kaj la diversaj invititoj okupiĝis pri la demando «Kiel eviti lingvan diskriminacion kaj ebligi multlingvismon laŭ la fundamentaj tekstoj de la Eŭropa Unio?» antaŭ publiko de sepdeko da homoj.

La tagon sufiĉe bone priparolis la amaskomunikiloj: momento ĉe la televidkanalo France 3 Alsace, pluraj artikoloj en la regiona ĵurnalo *Dernières Nouvelles d'Alsace*, duon-paĝo en la oficiala programo de 'Strasburgo festas la 25-landan Eŭropon'. La manifestacio estis menciita ĉe pluraj radiostacioj, interalie France Bleu, kaj la eŭska ĵurnalo *Berria* dediĉis eĉ tri artikolojn al la afero.

Ne hezitu sciigi al ni viajn opiniojn pri tiuj sugestoj, skribante al europa.bunt@eraro.com.

• Kantoj el Afriko

Théophile Mayoma el Kinŝaso, Demokratia Respubliko Kongo, serĉas kunlaboron pri siaj Esperanto-kantoj, da kiuj li posedas jam dekon. Du el ili – 'Triamonda Sufer' kaj 'Lasu Min Fari la Muzikon' – troviĝas en la sekvaj ttt-paĝoj: www.users.qwest.net/~daveh7/muziko/kanto1.mp3/ kaj www.users.qwest.net/~daveh7/muziko/kanto2.mp3/. Li serĉas helpojn trovi kantist(in)on, kiu povos rekanti por eventuala produkto kiel kasedoj aŭ kompaktdiskoj. Li povas alsendi la melodiojn de siaj aliaj kantoj nur kasede. □

**The Butler Library
really is open!**

Dear Editor,

As one of the ‘worthy souls’ mentioned by Paul Gubbins in his article on ‘Ni Festivalu 2004’, perhaps I can offer a few comments.

It is certainly true that the logistics of the ‘Ni Festivalu’ weekend went a bit awry. This seems to have been due to a lack of communication between EAB and the College; there is every reason to believe this has now been sorted out.

We have arranged with the College that, in principle, the Butler Library will be open to visitors (and to the Librarian!) when there are Esperanto events in the College. In most cases (excluding the Summer School) I shall also be there on the Friday before and the Monday after.

So anyone who has anything to do in the Library, or is just curious to have a look at it, whether or not they are taking part in the Esperanto event, is most welcome to come along during Esperanto weekends. If possible some advance warning to me (ancientbriton@tiscali.co.uk) would be helpful.

You can, of course, visit at any time when the room is not otherwise booked; in this case be sure to check with Esperanto House first. Over the next few months I shall be posting handy hints on using the Library at www.biblbut.org.

Geoffrey King,
Librarian

**Mapoj en ttt-paĝoj**

Estimataj,

Antaŭ kelkaj jaroj mi faris ttt-paĝon por mia regiono de Anglio. Kiam detaloj ŝanĝiĝas, mi povas rapide ĝisdatigi la paĝon: www.esperanto.westmidlands.btinternet.co.uk.

Ofte mi pensas: kial tiaj urbaj paĝoj ne estas haveblaj por ĉiu ‘aktiva’ urbo de la mondo? Grandega laboro, ĉu ne? Sed la delegita reto de UEA estus same grandega laboro, se oni nur nun komencus kompili ĝin!

Mia sugesto estas, ke UEA faru ttt-paĝon kiel mondmapon, eble laŭ individuaj kontinentoj, se necesas. Sur tiu mapo estu ligoj al ĉiu landa Esperanto-asocio. Naciaj asocioj siavice havu mapon de sia lando kun ligoj al la regionoj, urboj, fakaj organizaĵoj ktp. Se la nacia asocio ne havas sian propran ttt-paĝon, UEA eventuale povus fari ligon al simpla paĝo kun listo de la plej proksimaj perpoŝtaj kontaktoj.

Eble UEA povus ankaŭ pretigi la landajn mapojn por la naciaj asocioj kun klarigoj kiel ĝuste surmapigi la urbajn ligojn. Per tio estus iom da egaleco inter la landaj mappagoj.

Similajn mapojn mi vidis en diversaj ttt-paĝoj ekzemple: www.virtualtourist.com kaj www.intellicast.com/LocalWeather/World.

John Gbourne,
Wolverhampton

**Projekto ‘Lernejoj por Evoluo’**

Estimata redaktoro,

Dank’ al la projekto ‘Lernejoj por Evoluo’, mi ĵus travivis la plej belan sperton dum mia tuta Esperantista vivo.

Mi ricevis dudekon da leteretoj verkitaj en Esperanto de la infanoj de la lernejo Jules Verstraeten en Benino. Temas pri tre bona Esperanto (la instruisto, evidente, aparte volis relegi ĉiujn malnetojn antaŭ ol kopii al la fina versio), sed la enhavo estas infane spontana: Kiu estas la nomo de viaj gefiloj, kiu estas la urbestro de Italujo (tiel!), ĉu vi kutimas ludi piedpilkon ks.

Tio estis la plej impona afero, kiu okazis al mi en Esperantujo dum mia tuta vivo, multe pli valora ol la renkontiĝo kun dekoj da ŝtatestroj kaj ministroj kaj ĝeneralaj direktoroj de ĉiuspecaj internaciaj instancoj. Ĝi vere montras kiel estos, kiam infanoj lernos Esperanton en siaj lernejoj tra la mondo.

Pro tio vi aŭskultu, kiam oni parolas al vi pri la Projekto ‘Lernejoj por Evoluo’ kaj kiam oni petas vin pri financa subteno al la projekto por ke tiuj infanoj

Anekdoto el la historio

Jen anekdoto pri la sekretari-eco de H.J. Bulthuis, la konata Esperanto-verkisto de antaŭ la Dua Mondmilito, kiun rakontis lia filo, Rico. Hindrik Bulthuis estis ankaŭ ano en la nederlanda ŝtata Esperanto-ekzamenkomitato.

En la tridekaj jaroj mia patro kaj kelkaj aliaj ankaŭ regule ekzamenis por la elementa nivelo blindajn monaĥinojn en ilia instituto en la sudo de Nederlando. Ĉiam kun bonaj rezultoj. Sed iun tagon mia patro estis letere vokita al la Ministro de Instruado, Marchant. Ĉi tiu demandis, ĉu la onidiro estas vera, ke li subskribas la diplomojn antaŭ la ekzameno.

‘Jes, ĉar ĉu vi supozas, ke mi lasas malsukcesi tiujn povulinojn?’

La moŝto kompreneme balancis la kapon kaj respondis: ‘Tre humane, sed laŭleĝe malpermesite.’

‘Mi tamen daŭrigas tiel,’ aldonis la vokito.

‘Vian klaran, fidelan respondon mi admiras,’ reagis la Ministro.

Kaj Hindrik Jan Bulthuis ne plu ekzamenis en la blindulina instituto!

El *Literatura Foiro*,
n-ro 77 (feb. 1983) p.5.

havu kreton por la nigra tabulo kaj kajerojn kaj legolibretojn en Esperanto.

Renato Corsetti
(Esperantisto, kiu tre malmulte piedpilkudas lastatempe.)

**Jam tria eldono**

Karaj,

Ĵus alvenis ĉe ELNA nove presita, tria eldono de la libro *Esperanto – Learning and Using the International Language* de David Richardson – malmole bindita kun kolora kromkovrilo, dece farita por biblioteko publika aŭ privata, kaj sufiĉe fortika por elteni plurajn lernantojn sinsekve! Ĝi havas 380 paĝojn,

formate 150 x 220mm.

La enhavo restas senŝanĝa: Komenca enkonduko en la angla pri Esperanto kaj ĝiaj historio, kulturo, ekzistokialo kaj uzo. La dua parto estas baza kurso. Sekvas ampleksa legaĵaro en Esperanto kun lingvaj klarigoj en la angla – taŭga daŭriga kurso post la baza kurso. Fine estas ŝlosiloj al la leciondialogoj kaj vortaro Esperanto–angla kun ĉiuj Esperantaj vortoj troveblaj en la teksto de la libro, tiel ke eblas eĉ al komencanto komprene tralegi la libron sen plia vortaro.

La enkonduko de Humphrey Tonkin estas ĝisdatigita, kaj la ekstera papera kovrilo estas nova kaj pli bunta.

La podetala prezo ĉe ELNA estas \$15 usonaj dolaroj, same kiel por la antaŭa eldono. Triona rabato por revendoj.

Joel Brozovsky
Oficeja Direktoro
Esperanto-Ligo por
Norda Ameriko

• *La libron vendas EAB, do por pliaj informoj kontaktu la oficejon en Barlastono: tel. 0845 230 1887 (adreso sur p.2).*



Novaj kanzonoj

Karaj geamikoj,

Mi plezure anoncas la aperon de mia kompakt-disko *La ŝosoj de l' utopi*. Post la eldono en 2001 de la albumo *Duone*, jen dek novaj kanzonoj.

Por tiuj, kiuj ŝatis *Duone*, ili verŝajne retrovos la diversecon de ritmoj kaj etosoj jam en la antaŭa albumo. Jen pri homaj vivoj de infanaĝo ĝis morto, rakontoj, kiuj ekvivis dum mi tri jarojn koncertis sur la esperantistaj scenejoj de suda Francio.

Eblas trovi per la interreto eltiraĵojn de mia albumo kiel ankaŭ la kanzontekstojn (kaj aliajn surprizojn). Publika prezo de la KD: 15 eŭroj (+ sendkostoj).

Thierry Faverial
22bis rue Charnay Frachet
F-24000 Perigueux, Francio
www.tjeri.fr.st
thierry.faverial@laposte.net



Do you recall Cicely Osmond?

Dear editor,

On July 9, The Society for Cooperation in Russian and Soviet Studies – formerly the Society for

Cultural Relations in Russia – celebrates its 80th anniversary.

As part of its 80th birthday celebrations, the society will mount an exhibition of two of its valuable visual bequests from the Soviet Union in the 1920s and '30s – the Huntly Carter collection of photographs and the Cicely Osmond collection of visits to pioneers' camps, young people's education and training, children's books and posters and her travel reminiscences and correspondence, often written in Esperanto.

We know that she was a socialist, Esperantist, teacher and social worker. She also contributed 'Nature Notes' to the *Daily Worker* in the 1950s and '60s.

If any of your readers can let us know her dates of birth and any details about her life, other than her visits to the Soviet Union, we would be very pleased to hear from them.

Maybe there are people who still remember her or she has a family surviving her. Please contact us at 320 Brixton Road, London SW9 6AB. Tel. (020) 72742282 or e-mail: ruslibrary@scrss.org.uk.

Jean Turner, Hon. Secretary □

Nekrologoj

La 10-an de marto 2004 **Harold Brown** mortis en Högsby, Svedio, tuj antaŭ sia 79-a datreveno.

Li verkis multajn librojn kaj artikolojn en Esperanto. Li ofte prezentis prelegojn kaj programojn dum siaj vojaĝoj al diversaj landoj. Kelkaj el liaj pluraj originale verkitaj teatraĵoj estas prezentitaj diverslande de la konata aktoro Jerzy Fornal.

Lian libron *Leteroj el Svedio* estas ĵus eldonita de la Londona Esperanto-Klubo, de kiu li estis membro.

Kerstin Rohdin

Forpasis s-ro **Naren Dholakia**, esperantisto el Goa, Barato. Naren Dholakia, maljuna sed brila esperantisto de Barato forpasis en 2002 ĉirkaŭita de neniuj. Li naskiĝis en ŝtato

Guĝarato, okcidenta Barato, kaj studis en Ĝunagad. Poste li iĝis licenciulo pri teknologio en la Universitato de Mumbajo. Li elmigris al Britujo antaŭ jardekoj kaj longe laboris en Joseph Lucas Electricals Ltd. Li lernis Esperanton post sia emeritiĝo kaj ekagis por la lingvo en Britio. Li eĉ laboris en la kampo krei signolingvon por surdaj esperantistoj. Li tradukis la guĝaratan poemaron *Hridaj ganga* (Gango el koro) originale verkita de Ramesh Patel. La aŭtoro mem ankaŭ laŭdis la kvaliton de la traduko.

Antaŭ ses jaroj li revenis al Barato kaj loĝadis en Goa. Je tiu aĝo li ekagis tie por Esperanto, sed lia sano ne permesis lin daŭrigi. Mi kun miaj studentoj celis renkonti lin, sed mi aŭdis, ke mi venis tro malfrue.

D-ro P.V. Ranganayakulu,
Tirupati, Barato

Georges Lagrange (Serĝo Elgo), akademiano kaj prezidanto de Societo Yvonne Martinot, kiu posedas la Esperanto-centron Kvinpetalo en Bouresse, Francio, mortis la 30-an de aprilo 75-jara. Li estis ankaŭ profesia piano-agordisto, prezidanto de Franca Esperanto-Instituto, ekzamenisto, plej bone konata sub la pseŭdonimo Serĝo Elgo kiel aŭtoro de noveloj, romanoj, teatraĵoj kaj poemoj, tradukinto de klasikaĵoj francaj. Li kunlaboris por *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* en la fakoj muzika, teatra kaj teknika.

La programo de Kvinpetalo por 2004 daŭras kiel anoncite (Jean-Luc Tortel anstataŭos Georges en la kurso 'Altaj Studoj' dum aŭgusto).

Johano Rapley,
Francio

Membraro ☆ Membership

New Members

Ann Booth, Nelson
Jeanne Day, Fife
Michael Gunton, Southsea
Nathaniel Harrison, Carmarthen
Stan Keable, London
Robert Parker-Munn, Llanidloes
Colin Rowland, Plymouth
John Stark, Chelmsford

Passed Advanced Examination (written and oral) with Distinction

Paul Dennett, Halifax

Completed Elementary...!

Course

Viv O'Dunne, Barlaston

Completed the Free Postal Course

Sue Cameron, Weybridge
Mara Clifton, Hull
Guy Ottewell, Uplyme
Liz Weekes, Driffield

Deaths

Edward W. Moberley, London
Harold Brown, Sweden

GRUPOJ KAJ FEDERACIOJ

Ekspozico en Newbury

Ni sukcese distribuis informilojn pri nia Esperanto-klubo kun flugfolio kaj la unua leciono de la Senpaga Perpoŝta Kurso okaze de urba aranĝo por du-hora ekspozicio por lokaj kluboj. Komputila ekrano nia montris pri du perretaj kursoj kaj aŭdigis la viddiskon de Flavio Rebelo.

Tamen, ĉar nia ekrano estis en maloportuna loko, ni rondiris al ĉiuj tabloj kaj parolis al iuj ajn ĉe ili. Ni diris, ke la celo estas informi ilin pri la ebleco uzi Esperanton kiel pontolingvon en la Eŭropa Unio, substrekante, ke ne estas provo instigi lernadon de la lingvo.

Mi klarigis, ke la lingva problemo en EU malbonas kaj, ke ne necesas, ke ĉiuj lernu Esperanton por tion solvi. Necesas nur, ke la lingvistoj en la traduka kaj interpreta fako de EU tion lernu. Ili post nur kelkaj monatoj povus uzi ĝin kune kun nur siaj naciaj lingvoj.

Konstateblis, ke ĉi tia koncepto multe plaĉis – ne necesis mem lerni – kaj do estis multe pli da simpatio al la ideo de Esperanto.

Helen Fantom



Invito al porinfana fabelkonkurso

Pääatalo-Instituto estas kultura-literatura centro en Taivalkoski, norda Finnlando, nomita laŭ la eminenta verkisto Kalle Pääatalo (1919–2000). Inter ĝiaj agadoj estas fabelkonkurso por finnaj infanoj – la plej prestiĝa tia konkurso en Finnlando.

En 2000 la instituto aldonis al la konkurso Esperanton. En 2004 ĝi okazas la kvinan fojon.

Estas tri kategorioj: infanoj ĝis 8-jaraj, 9–10-jaraj kaj 11–13-jaraj.

La konkursaĵoj devas esti verkitaj originale en Esperanto de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejoj klasoj). En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco. Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksataj aparte.

La ĵurio aprezas precipe fabelecon kaj originalecon. Fabelo estas mallonga (1–5 folioj) konsekvenca rakonto, ligita al la infana mondo kaj karakterizata de sorĉeco, mistereco kaj supernaturaj okazaĵoj, kiuj kreas atmosferon fascinan al infanoj.

Oni sendu la konkursaĵojn poŝte, kaj ili alvenu plej laste la 15-an de septembro 2004 ĉe la adreso: Fabelkonkurso, PL 39, FI- 93401 Taivalkoski, Finnlando.

Oni uzu pseŭdonimon kaj menciui, ĉu temas pri grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

La rezultojn oni publikigos samtempe kun tiuj de la finna konkurso la 18-an de oktobro, kiam finnoj festas la nomtagon de Satu (finna vorto por fabelo). En ĉiu branĉo estas principe tri premioj.

Pli da informoj donas la komisiito s-ino Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando; rete: aini.vaaraniemi@pp.inet.fi.

Fabeloj, premiitaj en antaŭaj jaroj, legeblas en www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.

Literatura konkurso Liro-2004

La redakcio de *La Ondo de Esperanto* denove invitas al partopreno en la tradicia literatura konkurso Liro.

Liro-2004 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo.
2. Originala poezio.
3. Traduka poezio el la rusa lingvo: *Neznakomka* de Aleksandr Blok.
4. Traduka prozo el la rusa lingvo: *Birjuk* de Ivan Turgenev.
5. Traduka prozo el la angla lingvo: *The Devil in the Belfry* de Edgar Allan Poe.

En ĉiu originala branĉo oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, p.k. 1248, Ruslando; por pliaj adesaĵoj vidu pri la fotokonkurso sur la sekva paĝo). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ 15 oktobro 2004.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe: www.esperanto.org/ondo/ind-liro.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2004. La organizantoj ĝis la 1-a de januaro 2007 havos la rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage en okazo de eldono de antologio de Liro.

Sukcesojn! Halina Gorecka kaj Aleksander Korzhenkov

Fotokonkursi internacie

Post ses sukcesaj konkursoj la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la 7-a Internacia Fotokonkurso.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10 x 15cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (ab. ja. 1248, RU-236039 Kaliningrad, Ruslando), kaj atingi antaŭ la 1-a de decembro 2004.

La konkurso devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

La juĝkomisiono aljuĝos la sekvajn premiojn:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2005
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2005
3. Abono de *La Ondo de Esperanto* 2005.

Specialan premion (libroj de Sezonoj valore de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premio ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2004. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31-a de decembro 2006 uzi la ricevitaĵojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.


Sukcesojn!

Halina Gorecka kaj
Aleksander Korzhenkov
La Ondo de Esperanto /
Sezonoj

Rete: sezonoj@gazinter.net
www.esperanto.org/ondo

KRUCVORTENIGMO

CROSSWORD PUZZLE



Horizontale

1. Tuto de la malsupra membro de homo (5 literoj).
3. Reprodukti desegnon, bildon, skribon ks. sur diafana materialo, sekvante ĉiujn liniojn de ĝia konturo aŭ detaloj per pinto, plumo aŭ krajono; sklave reprodukti (5).
6. Ordo de mamuloj plejparte grajnovoraj, kies makzeloj havas kurbe ĉizilformajn incizivojn nur po du (8).
7. Arkoforma akvomasaĵo, kiu leviĝas kaj refalas ĉe la supraĵo de la maro, lago ks., sub la blovo de la vento (4).
8. Ringforma insulo, formita de koraloj, kun centra lageto kaj zono da rifoj (akuzitiva, 7).
9. Perforte apartigi partojn de objekto per tirado; detiri (4).
12. Japana simbolisma dramo aristokrata, naskiĝinta en la 14-a jarcento (3).
13. Genro de birdoj el la ordo galiniformaj, kies plumaron ornamas densaj blankaj makuletoj; certa specio estas ofte tenata kiel kortobirdo (pluralo, 7).
14. (Homa) mampinto (radiko, 3).
16. Sufikso uzata por formi nomojn de malsano, de oksidoj kaj saloj de pli malsupera valento, aŭ por indiki la abundecon de konsistiga elemento (radiko, 2).
17. Specio de aliumo, plunjara legomo kun specifaodoro kaj gusto, kun folioj similaj al la poreaj kaj kun akragusta bulbo; uzata por spicado kaj medicino (4).

Vertikale

1. Rondire turniĝi (4 literoj).
2. Detale antaŭkalkuli la jarajn spezojn de ŝtato, urbo, entrepreno, asocio ks. aŭ la tutan sumon de la monataj aŭ jaraj spezoj de privatulo (6).
4. Amara ĝuo de la rememoroj kaj bedaŭroj, fontinta el la portugala kulturo (7).
5. Fari longan, sinistran blekon, kiel strigoj aŭ lupoj (5).
8. Delikata, agrabla kaj subtilaodoro de kelkaj plantoj aŭ aliaj substancoj (5).
9. Ligna tabuleto, uzata kiel tegolo por kovri la tegmentojn (5).
10. Naskitoj, infanoj, filoj; posteuloj; disĉiploj (pluralo, 4).
11. Monto en Grekio, sur kiu mortis Heraklo (4).
12. Adjektiva formo de la nomo de urbo en sud-orienta Provenco, Francio, kiun portis ankaŭ fama literatura revuo Esperanta inter 1955 kaj 1962 (4).
15. Praktike arkaika pronomo uzebla por nomi la alparolaton (2).

Solvoj

1. 12h. Noo. 12v. Nica. 13. Nunnidj. 14. Cic. 15. Ci. 16. oz. 17. Aĵo.
7. Ondo. 8h. Aĵon. 8v. Aromo. 9h. Sirt. 9v. Sindo. 10. Idoj. 11. Oĵo.
1h. Gampo. 1v. Girt. 2. Buget. 3. Patsi. 4. Sadržado. 5. Uĵih. 6. Ronĵidj.